WIKIPEDIA

Kumika lingvo

La **Kumika Lingvo** (ankaŭ **Qumuq**, **Kumuk**, **Kumuklar**, kaj **Kumyki**) (Кумык) estas Tjurka lingvo, parolata de ĉirkaŭ 200 mil parolantoj (la Kumikoj) en la respubliko Dagestano de la Rusa Federacio.

La Kumikan oni skribadis per la Araba skribsistemo ĝis 1928, la Latina skribsistemo uziĝis dum 1928-1938, kaj la Cirila ekde tiam.

Ĝin jam forte influis la Azera kaj la Dargva, kaj ankaŭ la Rusa dum la ĵus pasinta jarcento.

Kumika lingvo	
Кумык	
Parolata en	Rusio
Regiono	Dagestano
Parolantoj	282 000
Skribo	Kumyk alphabet
Lingvistika klasifiko	
Altaja	
Tjurka	
Kipĉaka	
Kipĉak-kuma	
Kumika	
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-3	kum
Glottolog	kumy1244
Angla nomo	Kumyk
Franca nomo	koumyk

Eldonado kaj literaturo

Yırçı Qazaq (pron. Jirĉi Kazak) (naskiĝinta en 1839) kutime konsideratas fondinto de la Kumika literaturo.

La unuaj regulaj gazetoj kaj revuoj aperis en 1917-18. Aktuale, la gazeto *Ёлдаш* ([joldAŝ], *Kunulo*, rektasence "kuniranto", "iranta la saman vojon"), la posteulo de la Sovet-eraa *Ленин ёлу* ([lenin jolU], *Vojo de Lenin*) presas ĉirkaŭ 5 000 ekzemplerojn 3 foje ĉiusemajne.

Bibliografio

- Saodat Doniyorova kaj Toshtemirov Qahramonil. *Parlons Koumyk*. Parizo: Harmattan, 2004. ISBN 2-7475-6447-9.

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kumika_lingvo&oldid=6923392"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:01, 25 mar. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.